

Sintezo de la notoj de Robin' - Jar-kunsido de « Espéranto-Midi-Pyrénées » (FOIX – 16/12/2012)

- : - : - : - : - : -

Ĉeestantoj: Jorgos, Christophe Chazarein (= Kristof), Robin' Beto, Francoise Carrieu, Gilbert Darrieux, Nicole Champion, Marc Roger, Sylvie Roques, Marion Quenut,

Pli malfrue: Nathalie Ballaguy, Renato Ballaguy kaj Pierre Bigan.

Senkulpiĝis: ???

Komitatanoj: Gilbert Darrieux kaj Marion Quenut

Prezidas la kunsidon Jorgos.

Sekretarias la kunvenon Robin' Beto.

Jorgos malfermas la kunsidon dezirante bonvenon kaj rimarkigante, ke unuafoje okazas jarkunsido en Foix.

Tagordo: **1- Agad-raporto** **2- Financ-raporto** **3- Projektoj**

1. Agadraporto

1.1 Modifoj al la prezentita raporto

- “Tiu *Krokodilo* estis sendita al ĉiuj membroj”.

- “Marion kaj parte Vincent respondecas”.

- Pri radioelsendoj: “Tuluzo kaj Villefranche-de-Rouergue: "Promenado en Esperanto" rete aŭdebla ĉe <http://cfmradio.fr>”.

- Pri kursoj: “ĉiusemajne en Banjeroj de Bigoro”.

- Pri la Krokodila Renkontiĝo: de 27-a de Aprilo ĝis 1-a de Majo.

- Pri preleg-turneo de HORI Jasuo: ĉeestis 45 homoj en Tuluzo kaj 90 en Tarbezo, kie ĝi estis kunorganizita de « Esperanto 65 » kaj « Nucléaire ? Non, Merci ! 65 » kaj estigis regulan kunlaboron por francigi la kronikojn de Jasuo kaj por diskonigi.

1.2 Aliaj rimarkoj

Nicole Dejean en Montauban ne plu aktivas. En Castelsarrasin estas la gepatroj de Yves Bachimont. Jorgos proponas ideon organizi prezentojn de Esperanto dum 3-4 tagoj kun invito al instruistoj kun klasoj kaj sekva prelego celanta la gepatrojn por krei eventon kaj sciaron. Alian ideon: celi loĝlokojn de la subskribintoj de la kampanjo « Option Espéranto au Bac » (Jorgos jam preparis liston) kaj de voĉdonintoj al « EdE » ĉe eŭropaj balotoj.

1.3 Aprobo : Unanima.

2. Financ-raporto

2.1 Rimarkoj

Estus interese, ke venontan jaron Kristof prezentu apartan financ-raporton pri sia agado kadre de « Espéranto-Midi-Pyrénées », por ke ĝi povu klare bilanci pri ĉi tiu gravega agado.

Renato kaj CEEA fabrikigis propagandajn banderolojn kaj ekspozicion. Ĉi-lastata estas rigida do pli facile uzebla ol tiu de nia regiona federacio sed tamen malpli fortika; li do pretas pruntedoni ĝin kondiĉe, ke li mem transportu ĝin.

2.2 Aprobo : Unanima.

3. Projektoj

3.1 Rekonsidero al la kontrakto « Espéranto-France » - « Espéranto-Midi-Pyrénées »

La laborgrupo starigita pasintan jaron ne vere laboris sed la demando tamen restas aktuala.

Ĉi-teme esprimitaj ĝenoj efektive restas aktualaj. :

- **dependo al « Esperanto-France »**,
- bedaŭraj **rifuzoj je aniĝo** pro tiu ligiteco,
- **reprezentantoj** ĉe la Komitato de « Esperanto-France » **sen klara mandato**,
- nuna **funkciado de « Espéranto-Midi-Pyrénées » okazas malabee al ĝiaj statutoj** sekve, ĉu ŝanĝi la statutojn tiel, ke ili spegulu niajn nunajn bezonojn?

La celo de ĉi tiu laboro estas studi, kiel la regiona federacio povos starigi kunlaborajn rilatojn kun « Esperanto-France », « SAT-Amikaro » k.s. restante reale memstara (t.e. nek plureprezentiĝi en Komitato de « Esperanto-France » nek pluesti ties “aliĝanta asocio”, kiel ĝis nun), por ebligi « Espéranto-Midi-Pyrénées » kunigi ĉiujn divers-tendencajn esperantistojn cele pli intensan disvolvon de la tut-regiona agado.

Jorgos memorigas la unuajn kialojn de kreado de regiona federacio: kunigi la inform- kaj subten-fortojn de ĉiuj esperantistoj de la regiono kaj laŭeble plifacilan akiron de subvencioj el la regiona politika instanco. Antaŭ tiu kreado du kontrastaj ekzemploj venis de du najbaraj regionoj, nome Langvedoko-Rusiljono kun grandega plimulto el la esperantistoj aliĝintaj al « Esperanto-France » kaj Akvitanio, kie male nur 2-3 estis membroj de Esperanto-France dum forta aktiveco estis ĉirkaŭ Bordoza kaj aliaj urboj. Oni do komence kreis statutojn, kiuj lasis « Esperanto-Midi-Pyrénées » sendependa ĉar ne ĉiuj membroj akceptis rilati kun « Esperanto-France ». Poste la situacio tamen evoluis al aliĝo ĉe « Esperanto-France » laŭ nov-tipa kontrakto por i.a. de ĝi ricevi parton de kotizo el ĝiaj membroj loĝantaj en nia regiono. Precizigo de Marion: tiu kiomo entute reprezentas nun proksimume 10 €.

Aprobiĝas restarigo de la **laborgrupo kun jenaj membroj**: Jorgos, Robin', Gilbert, Marion. Estas kontaktendaj Flo, Vincent kaj Andreo por proponi al ili aliĝi al la laborgrupo.

Aprobiĝas jenaj gvidlinioj por la laboro de ĉi tiu komisiono:

- Limdatoj: fine de **junio**, publikado de **dokumento estigonta diskuton** inter la membroj; fine de **oktobro**, publikado de firmaj **proponoj por voĉdono** en la venonta jarkunsido.
- La laborgrupo devas pristudi 3 scenarojn: **kiaj statut-ŝanĝoj** kun ties sekvoj; **konservo** de la nunaj statutoj kun ties sekvoj; **nekonsidero** al la levita temo kun ties sekvoj.

Fine aprobiĝas la jena propono: « Esperanto-Midi-Pyrénées » ĉijare ne sendos reprezentanton al la Komitat-kunsidoj de « Esperanto-France ».

3.2 Volontulo de "Esperanto-Kultur-Centro" de Tuluzo

EKC-Tuluzo denove ĉijare akceptos volontulon. Same, kiel en la antaŭaj jaroj, EKC-Tuluzo disponigos ĝin al aliaj lokaj kluboj, kiuj pagos la rilatajn vetur-kostojn. Kadre de sia agado celanta **disvastigi Esperanton en region-partoj sen loka E-klubo** « Espéranto-Midi-Pyrénées » aprobas ripeti buĝetigon de 50 € por pagi tienajn vetur-kostojn de la volontulo, kiu akompanos al Kristof. Krome rebuĝetiĝas 50 € pasint-jare neelspezitaj, sekve disponeblas entute **100 €**.

3.3 La interreta portalo

La celo de tiu ĉi tut-regiona portalo estas duobla:

- esti la **montrofenestro de Esperanto en "MIDI-PYRÉNÉES"**,
- esti **interna komunikilo pri eventoj, disponebla materialo** k.s.

En ĝi la informaro aperas ĉu en agendo, ĉu tra artikoloj.

Ĝi nun estas laŭaspekte strukturita en du partoj, unu por EKC-Tuluzo, alia por « Espéranto-Midi-Pyrénées », ĉar ambaŭ asocioj pagis la kostojn (130 € por 3 jaroj). Plie per laŭdepartementaj paĝoj eblas aliri kontakteblojn al la diversaj lokaj kluboj. Se iu asocio deziras disponi pri propra paĝo en tiu ĉi portalo, ĝi povas sin turni al la ni por partopreni pagon de la kostoj.

Rilate al “nutrado” de la portalo, ĉiu esperanto-asocio estas forte invitata publikigi siajn informojn pere de la portalo. Por ĉi tion fari, ekzistas du ebloj:

- **sendi la informon / artikolon** al Marion Qu., kiu ĝin enportaligos,
- plej energi- kaj tempo-ŝpare, **peti de Marion klarigojn** pri tio, kiel **mem enmeti artikolon** en la retejon kaj memstare fari la laboron.

3.4 Disvastigo de Esperanto en la regiono

Kristof proponas daŭrigi la laboron komencitan pasintan jaron kaj disvolvatan de li. Konsiderante la tempon, kiun li disponas, kaj ankaŭ la malfacilon arigi sufiĉe da interesiĝantoj por starigi kurson en lokoj, kie ne estas esperanta vivo, li proponas centriĝi sian agadon ĉirkaŭ la **unua ŝtupo: informado per atelieroj** inkluzivantaj kvizojn kaj ludojn por komprenigi la ĉefajn ecojn de la lingvo, pli aktivigaj ol simplaj prelegoj, ankaŭ utiligante ĉeeston de la volontulo. Kiel **duan ŝtupon**, li proponas al interesiĝantoj lerni per la **“miksita kurso”** kun regulaj staĝetoj.

Aprobiĝas **buĝetigo de 250 €** por pagi kostojn de tiu agado, kiun denove ĉijare Kristof volontule plenumos.

Jorgos proponas al Kristof disponigi la kontaktojn de la Regiona Federacio de M.J.C.

3.5 Subteno al « Interkant » (Projekto « Karmen »)

Ĉar la « Krokodila Renkontiĝo » ne okazos ĉijare, ĉar pluraj regionanoj partoprenas ĝin kaj ĉar estas projektata **koncertoj en Lavelanet (09)** kaj Val d'Aran (okaze de planita unua « Okcitana E-Kongreso »), aprobiĝis **subteno je 100 €**. Plie aperos artikolo pri la projekto en la retejo kaj la « Eo-Mi-Py » instigas siajn membrojn partopreni en ĝi.

3.6 Regiona reto de Pasport-Servanoj (ideoj de Gilbert D.)

En regiono, kies unuavida allogo ne estas granda kaj esperantistaro tre dise lokata, estus interese starigi reton de PS-anoj kun unu kunordiganto. Tiel ĉi eblos **organizi gastigadon en diversaj hejmoj** tra la regiono. La gasto turniĝos al la kunordiganto, kiu organizos ian gastigan turneon, simpligante kaj riĉigante la vojaĝon de la gasto.

Plia disvolvo eblos se PS-anoj de tiu reto inter si kolektos monon kaj **proponos al interesa vojaĝanto** senpage traveturi la regionon interŝanĝe de **kontribuo al la loka esperantista vivo** (ekz. per prelegeto).

3.7 Subteno al la « 20-a E-Korusa staĝo ĉe Pireneoj » (por « Tut-Pirenea E-Koruso »)

Laŭ peto de Jorgos, aprobiĝis subteno je **50 € al la venonta korusa staĝo** en Arjeĝujo (1-a / 9-a de marto). Kaj « Espéranto-Midi-Pyrénées » estos petata en sia venonta Jar-kunsido decidi ĉu ĝi mem volas respondi pri la sekvaj eldonoj anstataŭ sol-departementa C.E.E.A. ...cele ricevi regionajn subvenciojn.

3.8 Elekto de la nova Komitato de « Espéranto-Midi-Pyrénées »

Elektiĝis Jorgos (Aldeio sed reprezentanta Arjeĝion), **Gilbert Darrieux**, **Marc Roger**, **Marion Quenut**, **Andreo Andrieu**, **Bernard Legeay** kaj **Vincent Descargues**.